

BIBLIOTEKO  
DE LA LINGVO INTERNACIA  
**ESPERANTO.**

FOLIOJ 31 kaj 32.

→ Nr. 84. ←



A. S. PUŜKIN.

# ŜTONA GASTO.

—  
P R O Z A T R A D U K O

DE

**N. BOROVKO.**

—  
ODESO.

Presejo «Centralnaja», str. Poŝtovaja, 39.  
1895.

Дозволено цензурою. — С.-Петербургъ, 8 Декабря 1894 г.

**H**eroo de legendo pri konata al ĉiuj Don Juan estas hispana „kaballero“ Don Juan Tenorio. Tiu ĉi familio efektive ekzistis en XIV centjaro kaj en unu registro de kavaliroj de ordeno de Banda (kavaliroj de ruĝa ligilo) oni vidas ĝian insignon. Don Juan Tenorio vivis en tempo de regado de reĝo de Kastilio Pedro Kruela, estis lia favorato kaj prenis parton je liaj malĉastaj aventuroj. Per tio ĉi limiĝas historiaj scioj pri li. Legendo kreis el li tipon de delogisto, kiu vivas per vivo, plena de aventuroj. Unu fojon Don Juan en nokto enŝtelas sin al filino de komandoro Ulloa. Al krioj de knabino alkuras ŝia patro kaj Don Juan lin mortigas. Oni enterigis komandoron en preĝejo de monaĥejo de Francisko. Don Juan aperas tien kaj ofendas per vortoj lian monumenton; pro tio ĉi monumento fortiras Juan'on en inferon. Ekzistas scio, ke efektiva Don Juan, je postulo de parencaro de mortigita komandoro, estis enlogita de monaĥoj en ilian monaĥejon kaj estis mortigita de ili; por komprenigi lian malaperon monaĥoj propagandis famon, ke monumento de komandoro, ofendita de Don Juan, fortiris lin en inferon. En tiu-ĉi formo legendo komencis ricevi literaturan prilaboradon de XVII centjaro. En 1630 jaro aperis en lingvo hispana dramo de Tirso-de-Molina: „Delogisto el Sivilio aŭ Ŝtona Gasto“; dua hispana peco de tiu-ĉi centjaro kaj je tiu-ĉi sama temo, restinta en manuskripto, apartenas al Alonzo-de-Kardoba. Dramo de Molina fariĝis konata en Italujo kaj sekvigis imitojn de Ĉikonjini kaj de Ĝilberti. En 1658 jaro itala aktoraro kun granda sukceso lu-

dis „Ŝtonan Gaston“ en Parizo kaj tio-ĉi sekvigis tutan vicon da francaj pecoj pri Don Ĵuan. En tiu-ĉi sama 1658 jaro aperas „Don Ĵuan“ de Dorimon; post ĝi—dramo de Villié, glora komedio de Molier' (1665), transfaro de tiu-ĉi komedio de Kornel' kaj peco de Rozimon'. En XVIII centjaro aperis dramoj de itala poeto Goldoni (1736) kaj itala abato Lorenzo Da-Ponte (1787), al vortoj de kiu estas verkita muziko de opero de Mocart'. En XIX centjaro estis skribitaj—en lingvo germana: fantazio de Hofman' kaj tragedio de Grabbe („Don Ĵuan kaj Faust“), en lingvo rusa „Ŝtona Gasto“ de Puŝkin kaj en lingvo franca „Don Ĵuan de Marano“ de A. Dumas (1836).

Sed legendo pri Don Ĵuan havis ankoraŭ duan redakcion. Laŭ tiu-ĉi redakcio Don Ĵuan el familio de Maranja vivas ankaŭ kiel heroo de unua legendo, sed dank' al supernaturaj fortoj li pentas kaj mortas tute pardonita. Unua prilaboro de legendo en tiu-ĉi formo estis rakonto de Prospero Merime („Les âmes du purgatoire“ — „Animoj de purigejo“, 1834); post li sekvis Sorilia (1844) kaj rusa poeto A. Tolstoj („Don Ĵuan“, drama poemo, 1859). Fine, tute foriginte supernaturan elementon, tipon de Don Ĵuan prilaboradis Lenau (1844), Viese, Braun von Braunthal, Paul Heyse kaj Armand („Don Ĵuan d'Armana“, 1886.\*).

„Ŝtona Gasto“ de Puŝkin (1799—1837) estas verkita en aŭtuno de 1830 jaro en lia vilaĝo Boldino, en la gubernio Niĵni-Novgorod. Sed tiu-ĉi tragedio—unu el plej grandaj kreitaĵoj de poezio—estis presita nur en 1839 jaro, post morto de aŭtoro, kiu estis mortigita en duelo kun Dantes' en 1837 jaro. Glora rusa kritikisto Belinskij estis unua, kiu komprenis tutan majestecon de tiu-ĉi malgranda per mezuro produktaĵo, nominte ĝin „perlo de kreitaĵoj de Puŝkin“, „plej kara, plej luksa diamanto en lia krono de poeto“.—„Tragedio aŭ komedio, diras Belinskij, kiel ĉiu arta produktaĵo, devas prezenti apartan, fermitan en si mem mondon, t. e. ĝi devas havi unuecon de agado, kiu eliras ne el ekstera formo, sed el ideo, ku-

---

\*) E. Braun: „Literatura historio de tipo de Don Ĵuan“.

ŝanta en ĝia fundamento. Ĝi allasas nek elementojn, fremdajn al ĝia ideo, nek eksterajn puŝojn, kiuj helpus al irado de ago, sed disvolviĝas imanente, t. e. el interne de si mem, kiel arbro disvolviĝas el grajno. Tial ĉiu peco en drama formo, esprimanta tute kaj tute konsumanta ĝian ideon, tuta kaj finita en arta signifo, t. e. kiu prezentas per si apartan kaj fermitan en si mondon—estas aŭ tragedio aŭ komedio, kio dependas de esenco de ĝia enhavo kaj tute ne dependas de ĝia amplekso kaj grandeco, eĉ se ĝi etendiĝas ne pli ol sur kvin paĝoj. Tiel, ekzemple, pecoj de Puŝkin: „Mocart' kaj Salieri“, „Avara Kavaliro“, „Nimfo“, „Boris Godunov“ kaj „Ŝtona Gasto“ — estas tragedioj en plena senco de tiu-ĉi vorto, kiel pecoj, esprimantaj en drama formo ideon de venko de morala leĝo kaj prezentantaj, ĉiu aparte, tute apartan kaj fermitan en si mem mondon“ \*).

„Ŝtona Gasto“, postmorta verko de Puŝkin, estas drama poemo... Heroo de tiu-ĉi malgranda dramo estas Don Ĵuan, tiu sama, kiu aperas heroo en libreto de glora opero de Mocart'; sed ĉe Puŝkin komunaj kun tiu-ĉi libreto estas nur nomoj de agantaj personoj, nomoj de Don Ĵuan, de donino Anno, de Leporello; ideo do de tuta produktaĵo, ĝia dismeto, irado, kunligo kaj disligo, situacio de agantaj personoj—ĉio tio-ĉi estas ĉe Puŝkin lia propra, originala. Poemo etendiĝas ne pli, ol sur tridek kvin paĝoj kaj malgraŭ tio-ĉi ĝi estas tuta, limigita produktaĵo de krea genio, arta formo, kiu tute ampleksis senfinan ideon, metitan en ĝia fundamento, grandegula kreitaĵo de granda majstro, kies kreanta mano povis konsumi sur tiuj-ĉi malmultaj tridek kvin paĝoj grandan ideon, tutan, ĝis plej malgranda nuanco. Ni petas ne akcepti niajn vortojn kiel juĝo: ne, ili ne estas juĝo, ili estas nur sonoj, ekkrioj, interjekcioj... Ni ekvidis malproksimon sen limoj, profundajon sen fino—kaj ni kun tremo reiris posten“ \*\*).

---


\*) *Belinskij* „Verkoj“, t. III, 388—9, 1862.

\*\*\*) *Belinskij*: „Verkoj“, t. III, 61,62.

„Ŝtona Gasto“ estas skribita per senrimaj versoj. Mi jam diris mian opinion pri tradukoj de grandaj produktajoj en rimoj; („Esperantisto“ 1891, № 10). Tie-ĉi mi povas nur aldoni sekvantajn vortojn de Belinskij pri tradukoj de verkoj de Ŝekspir: „mi estas konvinkita, ke por perfekta traduko per versoj de dramoj de Ŝekspir tradukanto mem devas esti Ŝekspir, alie lia traduko estos eĉ se iom malĝusta,—malĝusta aŭ laŭ ideo aŭ laŭ formo kaj ĉiam estos pli aŭ malpli subjektiva. Por legado oni povas kaj devas traduki Ŝekspir'ou per prozo“. \*) — Mi pensas ke ĝis oni trovos arton ne aliigi per versaj tradukoj figurojn de originalo, tiu-ĉi postulo devas esti uzata por tradukoj de verkoj de ĉiu granda poeto. Almenaŭ ĝi devas esti uzata por tradukoj de dramaj kreaĵoj, en kiuj maniero de esprimado de herooj estas ofte por artisto forta rimedo klarigi pli bone iliajn karakterojn.

En prilaboro de tipo de Don Juan Puŝkin per nenio ŝuldis al siaj antaŭirantoj. Oni povas nur montri scenon de invito monumenton, kiu estas tre simila je tiu-ĉi sama sceno de Molier' kaj oni povas supozi influon de Ŝekspir en IV sceno, kiam Don Juan diras sian nomon (Ŝekspir: „Riĉard III“, akt. I, sc. II). El eminentaj artistoj rolon de Don Juan en „Ŝtona Gasto“ ludis sur sceno Rossi. Rusa komponitoro Dargomiĵskij verkis muzikon al vortoj de Puŝkin, sed indeco de tiu-ĉi opero (Ŝtona Gasto) ĝis nun estas disputa demando de muzika kritiko.

### *Tradukinto.*



---

\*) *Belinskij: „Verkoj“, t. III, 362, rimarko.*

**Leporello.**

O, statua gentilissima  
Del gran Commendatore!  
Ah, Padroni!...

„Don Giovanni“.

Doñ' Juan'.  
Leporello, lia servanto.  
Anno de Solva.  
Laura, aktorino.  
Don' Karlos'.  
Monaño.  
Gastoj de Laura.  
Monumento de komandoro.



## Sceno 1.

Nokto. Tombejo proksime de Madrido.

Don Juan' kaj Leporello.

**Don' Juan'.**

Ni atendu tie-ĉi nokton. Uf! fine ni atingis pordegon de Madrido. Baldaŭ mi kuregos sur konataj stratoj, kovrinte lipharojn per mantelo kaj brovojn per ĉapelo. Kiel vi pensas: ĉu oni povas min rekoni?

**Leporello.**

Jes, rekoni Don' Juan'on estas tre malfacile! Tiaj, kiel li, estas ja tia multego!

**Don' Juan'.**

Ĉu efektive? Sed kiu do min rekonos?

**Leporello.**

Unua gardanto, gitano aŭ malsobra muzikisto aŭ via propra egalulo—aroganta kavaliro, en mantelo, kun glavo sub brako, en ĉapelo.

**Don' Juan'.**

Kia estos malfeliĉo eĉ se oni rekonus! Nur mi ne volus renkonti reĝon mem, sed, cetere, mi neniun timas en Madrido.

**Leporello.**

Kaj jam morgaŭ oni sciigos reĝon, ke Don' Juan' revenis arbitre el ekzilo en Madridon. Kion, diru, li tiam faros al Vi?

**Don' Juan'.**

Li min resendos. Ja certe oni ne dehakos al mi kapon: mi ne estas ja regna krimulo! Li min forigis pro amo al mi, por ke familio de mortigito lasu min en paco.

**Leporello.**

Jen estas. Estus pli bone, se Vi sidus trankvile tie.

**Don' Juan'.**

Mi dankas humile! Mi apenaŭ ne mortis tie pro enuo. Kiaj homoj! kia tero! Sed ĉielo? ĝi estas vera fumo; kaj virinoj? Jen ĉu vi vidas, mia malsaga Leporello: mi, certe, ne elŝanĝos lastan vilaĝaninon de Andaluzujo por unuaj belulinoj de tie. Je komenco ili plaĉis al mi per bluaj okuloj, per blankaĵo kaj per modesteco, sed pleje per novaĵo; sed, dank' al

Dio mi baldaŭ konjektis: mi ekvidis, ke oni ne devas eĉ esti konata kun ili,—ili ne havas vivon, ili ĉiuj estas vaksaj pupoj... Kaj niaj!... Sed aŭskultu: tiu-ĉi loko estas konata al ni. Ĉu vi ĝin rekonis?

**Leporello.**

Kompreneble. Moualiejo de Antonio estas por mi memoriginda. Vi tien-ĉi veturadis kaj ĉevalojn mi tenadis en tiu-ĉi arbareto.... Malbenita ofico—oni devas konfesi! Vi tie-ĉi pasigis tempon, kedu, pli agrable, ol mi.

**Don' Juan** (reve).

Malfeliĉa Inezo! Ŝi jam ne ekzistas! Kiel mi ŝin amis!

**Leporello.**

Inezon kun nigraj okuloj? Ho, mi memoras! Tri monatojn Vi ĉirkaŭflirtis ŝin—fine diablo helpis.

**Don' Juan.**

En julio.... en nokto... Strangan agrablecon mi trovadis en ŝia malĝoja rigardo kaj en velkintaj lipetoj. Tio-ĉi estas stranga. Vi ne trovis, ŝajnas, ke ŝi estus belulino. Kaj efektive, — ŝi havis malmulte da vera beleco. Okuloj... nur okuloj kaj rigardo... Tian rigardon jam mi neniam renkontadis! Sed ŝia voĉo estis mallaŭta kaj malforta, kiel ĉe malsana... Kaj ŝia edzo estis kruda fripono,—mi tion-ĉi ekkonis malfrue... Malfeliĉa Inezo!

**Leporello.**

Nu, post ŝi aliaj estis.

**Don' Juan.**

Vere.

**Leporello.**

Kaj se ni estos vivaj—aliaj ankoraŭ estos.

**Don' Juan'.**

Efektive.

**Leporello.**

Nun kian ni serĉos en Madrido?

**Don' Juan'.**

O, Laura'n! Mi kuros rekte al ŝi.

**Leporello.**

Bone.

**Don' Juan'.**

Rekte al ŝia pordo,—kaj se iu jam estas ĉe ŝi—mi petas salti en fenestron.

**Leporello.**

Kompreneble. Nu, ni gajigis. Mortintinoj nin trankviligas mallonge. Kiu iras al ni?

(Monah'o eniras).

**Monah'o.**

Ŝi tuj alveturos tien-ĉi. Kiu tie-ĉi estas? Ĉu Vi estas servantoj de donino Anno?

**Leporello.**

Ne, ni mem estas sinjoroj. Ni tie-ĉi promenas.

**Don' Juan'.**

Kaj kiun Vi atendas?

**Monah'o.**

Donino Anno devas tuj alveturi al ĉerkujo de edzo.

**Don' Juan'.**

Donino Anno de Solva? Kiel? Edzino de komandoro, mortigita... mi ne memoras de kiu.

**Monah'o.**

De malĉasta, senkonsciencia, malpia Don' Juan'.

**Leporello.**

Ho, jen kiel estas! Famo pri Don' Juan' penetris eĉ en pacan monaĥejon: ermitoj kantas laŭdojn al li.

**Monah'o.**

Ĉu li estas, eble, konata al Vi?

**Leporello.**

Al ni? Tute ne. Kaj kie li estas nun?

**Monah'o.**

Li ne estas tie-ĉi. Li estas en ekzilo, malproksime.

**Leporello.**

Kaj dank' al Dio! Ju pli malproksime li estas, des ĝi estas pli bona. Oni prenis ĉiujn ilin, malĉastulojn, en unu sakon kaj—en maron.

**Don' Juan'.**

Kio? Kion vi mensogas?

**Leporello.**

Silentu: mi diras ja intence.

**Don' Juan'.**

Kaj tie-ĉi oni enterigis komandoron?

**Monaĥo.**

Tie-ĉi. Edzino konstruis al li monumenton kaj ĉiutage alveturas tien-ĉi preĝi kaj plori.

**Don' Juan'.**

Kia stranga vidvino! Mortinto estis ĵaluzema ne vane: li tenis fermite doninon Annon; neniu el ni ŝin vidis. Kaj ĉu ŝi estas beleta?

**Monaĥo.**

Ni, ermitaj, ne devas nin ĉarmi per virina beleco; sed oni ne povas malkonfesi: eĉ Diservanto ne povas neigi ŝian mirindan belecon.

**Don' Juan'.**

Mi volus interparoli kun ŝi.

**Monaĥo.**

O, donino Anno neniam parolas kun viro.

**Don' Juan'.**

Kaj kun Vi, mia patro?

**Monaĥo.**

Ĝi estas alia afero: mi estas monaĥo. Sed jen ŝi estas.

● (Donino Anno eniras).

**D. Anno.**

Malfermu, mia patro.

**Monaĥo.**

Tuj, sinjorino: mi Vin atendis.

(D. Anno iras post monaĥo).

**Leporello.**

Nu, kia ŝi estas?

**Don' Juan'.**

Oni tute ne vidas ŝin sub tiu-ĉi nigra vualo de vidvino; mi apenaŭ rimarkis mallarĝan kalkanon.

**Leporello.**

Por Vi estas sufiĉa. Ĉe Vi imago en minuto alpentros restan. Ĝi estas ĉe Vi pli lerta ol pentristo; por Vi estas tute egale, de kio komenci: de brovoj aŭ de piedoj.

**Don' Juan'.**

Aŭskultu, Leporello: mi konatiĝos kun ŝi.

**Leporello** (flanken).

Jen Vi havas! Oni tre bezonas. Faligis edzon kaj volas ekrigardi larmojn de vidvino. Senkonscienca!

**Don' Juan'.**

Tamen jam krepuskiĝis. Ĝis luno ne supreniris super ni kaj ne aliformigis mallumon en luman krepuskon—ni eniru Madridon.

**Leporello.**

Ho, Dio! Grando de Hispanujo atendas kiel ŝtelisto nokton kaj timas lunon! Kaj ĉu longe mi klopodos kun li? Oni ne havas, certe, jam fortojn!

---

## Sceno 2.

Vespermango ĉe Laura.

**Unua gasto.**

Mi ĵuras al vi, Laura: vi neniam ludis kun tia perfekteco! Kiel fidele vi komprenis vian rolon!

**Dua.**

Kiel vi ĝin disvolvis! Kun kia forto!

**Tria.**

Kun kia arto!

**Laura.**

Jes, hodiaŭ al mi prosperis ĉiu movo, ĉiu vorto. Mi metis min libere al inspiro. Vortoj verŝis sin, kvazaŭ naskis ilin ne timema memoro, sed koro.

**Unua.**

Vere. Kaj nun ankoraŭ viaj okuloj brilas kaj vangoj flamas,—via ravo ne silentiĝas. Ne permesu, Laura, al ĝi malvarmiĝi senfrukte: kantu, Laura, kantu ion!

**Laura.**

Donu al mi gitaron.

(Ŝi kantas).

**Ĉiuj.**

Ho, brave! brave! Mirinde! Senkompare!

**Unua gasto.**

Ni dankas, sorĉistino! Vi sorĉas niajn korojn. El plezuroj de vivo muziko cedas nur al amo; sed amo ankaŭ estas melodio. Rigardu: eĉ Karlos', via malafabla gasto, estas tuŝita!

**Dua.**

Kiaj sonoj! Kiom da sento ili havas! Kaj kies estas vortoj, Laura?

**Laura.**

De Don' Ĵuan'!

**Don' Karlos'.**

Kio? Don' Ĵuan'!

**Laura.**

Ilin verkis iam mia fidela amiko, mia firtema amanto.

**Don' Karlos'.**

Via Don' Ĵuan' estas malpiulo kaj abomenulo kaj vi—vi estas malsaĝulino!

**Laura.**

Vi frenezigiĝis! Sed mi tuj ordonos al miaj servantoj vin buĉi, kvankam vi estas granda de Hispanujo.

**Don' Karlos' (levas sin).**

Voku do ilin!

**Unua gasto.**

Laura, ĉesu! Ne koleru, Don' Karlos'. Ŝi forgesis...

**Laura.**

Kion? Ke Don' Ĵuan' honeste mortigis en duelo lian fraton? Estas domaĝo, vere, ke ne lin mem.

**Don' Karlos'.**

Mi estas malsaĝa, ke mi ekkoleris.

**Laura.**

Ha, vi mem konsentas, ke vi estas malsaĝa! Tial ni paciĝu.

**Don' Karlos'.**

Mi estas kulpa, Laura. Pardonu min. Sed mi ne povas aŭdi indiferece tiun-ĉi nomon.

**Laura.**

Kaj ĉu mi estas kulpa, ke tiu-ĉi nomo ĉiuminute al mi venas sur langon?

**Gasto.**

Nu, por signo de tio, ke vi jam tute ne koleras. kantu ankoraŭ, Laura.

**Laura.**

Jes, por adiaŭdiro: jam estas nokto. Sed kion do mi kantos? Ha, aŭskultu!

(Ŝi kantas).

**Ĉiuj.**

Belege! senkompare!

**Laura.**

Adiaŭ do, sinjoroj.

**Gastoj.**

Adiaŭ, Laura.

(Ili eliras. Laura haltigas Don' Karlos').

**Laura.**

Vi, furioza, restu ĉe mi. Vi plaĉis al mi: vi memorigis al mi Don' Juan'on, kiam vi ekmallaŭdis min kaj kunpremis kun grinco dentojn.

**Don' Karlos'.**

Feliĉulo! Vi sekve amis lin?

(Laura faras jesan signon).

**Don' Karlos'.**

Tre?

**Laura.**

Tre.

**Don' Karlos'.**

Kaj ĉu nun vi amas lin?

**Laura.**

En tiu-ĉi minuto? Ne, mi ne amas. Mi ne povas ami du. Nun mi vin amas.

**Don' Karlos'.**

Diru, Laura: kian aĝon vi havas?

**Laura.**

Dek ok jarojn.

**Don' Karlos'.**

Vi estas juna kaj estos juna ankoraŭ kvin aŭ ses jarojn. Ankoraŭ eble ses jarojn ili puŝos sin amase ĉe vi, karesos vin, vin dorlotos kaj faros donacojn kaj amuzigos vin per noktaj serenadoj kaj en nokto mortigos por vi unu duan sur kruciĝoj

de vojoj. Sed kiam tempo foriros, kiam viaj okuloj fariĝos kavajaj kaj palpebroj, sulkinginte, fariĝos nigraj kaj grizaĵo briletos en via harligo kaj oni nomados vin maljunulino,—tiam kion vi diros?

**Laura.**

Tiam?... Sed kial pensi pri tio-ĉi? Kia interparolo? Aŭ ĉu vi ĉiam havas tiajn pensojn? Iru, malfermu balkonon.... Kiel ĉielo estas trankvila! Varma aero estas senmova; nokto odoras citronon kaj laŭron, hela luno brilas sur densa kaj malluma bluaĵo kaj tirante, klare krias gardistoj!... Sed malproksime, en nordo—en Parizo—ĉielo, eble, estas kovrita de nuboj, malvarma pluvo falas kaj vento blovas. Sed kion tio nin interesas? Aŭskultu, Karlos: mi postulas, ke vi ridetu... Nu, tiel, bone!

**Don' Karlos'.**

Kara demono.

(Oni frapas).

**Don' Juan'.**

He, Laura!

**Laura.**

Kiu estas tie? Kies estas tiu-ĉi voĉo?

**Don' Juan'.**

Malfermu!

**Laura.**

Ĉu efektive! Dio!

(Ŝi malfermas pordon; Don' Juan' eniras).

**Don' Juan'.**

Bonan vesperon!

**Laura.**

Don' Juan'!

(Ŝi ĵetas sin al kolo al li).

**Don' Karlos'.**

Kiel! Don' Juan'!

**Don' Juan'.**

Laura, kara amikino! (Li ŝin kisas) Kiu estas ĉe vi, mia Laura?

**Don' Karlos'.**

Mi, Don' Karlos'.



**Don' Juan'.**

Jen estas neatendita renkonto! Morgaŭ mi estos tuta al viaj servoj....

**Don' Karlos'**

Ne! Nun,—tuj.

**Laura.**

Don' Karlos', ĉesu! Vi ne estas sur strato, vi estas ĉe mi,—plaĉu al Vi eliri for.

**Don' Karlos'** (ne aŭskultante).

Mi atendas. Nu, kio do estas? Vi havas ja glavon.

**Don' Juan'.**

Se vi ne povas esti pacienca—bone.

(Ili batalas).

**Laura.**

Aj, aj, Juan'! (Ŝi ĵetas sin sur liton. Don' Karlos' falas).

**Don' Juan'.**

Levu vin, Laura: estas finita.

**Laura.**

Kio tie estas? Ĉu li estas mortigita? Bonege! en mia ĉambro! Kion mi nun faros, diboĉulo, diablo? Kien mi lin elĵetos?

**Don' Juan'.**

Li, eble, estas ankoraŭ viva... (Li ĉirkaŭrigardas korpon).

**Laura.**

Jes, estas viva! Rigardu, malbenita! Vi puŝis rekte en koron, ja ne preter. Eĉ sango ne iras el triangula malgranda vundo, sed li jam ne spiras,—kiel?

**Don' Juan'.**

Kion fari? Li mem tion volis...

**Laura.**

Ha, Don' Juan', mi, certe, havas ĉagrenon! Eternaj pe-toloj—kaj ĉiam vi estas senkulpa. De kie vi venas? Ĉu jam longan tempon vi estas tie-ĉi?

**Don' Juan'.**

Mi ĵus alveturis kaj nur sekrete: mi ne estas ja pardonita.

**Laura.**

Kaj vi rememorigis tuj pri via Laura? Jen tio-ĉi estas bona! Sed ne,—mi ne kredas. Vi iris okaze preter kaj ekvidis domon.

**Don' Juan'.**

Ne, mia Laura: demandu Leporello'n. Mi loĝas posturbo, en malbenita vento. Mi alvenis serĉi Laura'n en Madrido.  
(Li ŝin kisas).

**Laura.**

Mia amiko! Atendu.... apud mortinto!... Kion ni faros kun li?

**Don' Juan'.**

Lasu lin: mi lin elportos antaŭ tagiĝo, frue, sub mantelo kaj metos sur disvojo.

**Laura.**

Nur gardu vin, ke oni vin ne ekvidu. Kiel bone vi faris, ke vi aperis unu minuton pli malfrue! Viaj amikoj tie-ĉi vespermanĝis ĉe mi. Ili ĵus eliris. Se vi ilin trovus!

**Don' Juan'.**

Kaj jam longan tempon, Laura, vi lin amas?

**Laura.**

Kiun? Vi deliras.

**Don' Juan'.**

Ne. Kaj, diru al mi, kiom da fojoj vi havis tempon perfidi min en mia foresto?

**Laura.**

Kaj vi, diboĉulo?

**Don' Juan'.**

Diru do... Ne, ni poste parolos!...

---

### Sceno 3.

Tombejo. Monumento de komandoro.

**Don' Juan'.**

Ĉio fariĝas por pli bona: mortiginte senatende Don' Karlos'on, mi kaŝis min tie-ĉi kiel humila ermito kaj ĉiutage mi vidas mian belegan vidvinon kaj, ŝajnas al mi, mi ankaŭ estas ri-

markita de ŝi. Ĝis nun ni ambaŭ ceremoniis, sed hodiaŭ mi komencos interparolon kun ŝi, tempo estas! De kio mi komencos? „Ĉu mi kuraĝos“ aŭ ne: „sinjorino“... ba! Kio venos en kapon, tion nepretigte mi diros, improvizante aman kanton. Ŝi devus jam alveturi. Komandoro, mi pensas, enuas sen ŝi. Kia grandegulo li estas prezentita tie-ĉi! Kiaj ŝultroj! kia Herkuleso! Kaj mortinto mem estis malgranda kaj malgrasa: stariĝante tie-ĉi sur piedofingroj, li ne povus atingi per mano sian nazon. Kiam ni kunvenis post Eskurialo, li surpuŝis sin sur mian glavon kaj formortis kiel libelo sur pinglo, sed li estis fiero kaj kuraĝa kaj havis krudan animon.... A! jen ŝi estas.

(D. Anno eniras).

**D. Anno.**

Ree li estas tie-ĉi... Mia patro, mi Vin distris en Viaj pensoj, — pardonu.

**Don' Juan'.**

Mi devas peti pardonon ĉe Vi, sinjorino. Ĉu mi malhelpas, eble, Vian malĝojon sin elverŝi libere?

**D. Anno.**

Ne, mia patro: mia malĝojo estas en mi; apud Vi miaj preĝoj povas sin levi humile al ĉielo. Mi petas Vin ankaŭ aligi Vian voĉon al ili.

**Don' Juan'.**

Ĉu mi, mi preĝos kun Vi, donino Anno?! Mi ne estas inda tian sorton. Mi ne estos aroganta ripeti per malvirta buŝo Vian sanktan petegon; mi nur de malproksime rigardas Vin kun respekto, kiam Vi mallaŭte kliniĝinte, disŝutas nigrajn buklojn sur pala marmoro, kaj ŝajnas al mi, ke tiun-ĉi ĉerkujon sekrete vizitis anĝelo. Tiam mi ne trovas preĝojn en konfuzita koro. Mi miras silente kaj pensas: feliĉa estas tiu, kies malvarma marmoro estas varmigita de ŝia ĉiela spirado kaj ŝprucita de larmoj de ŝia amo.

**D. Anno.**

Kiaj strangaj paroloj!

**Don' Juan'.**

Sinjorino!

**D. Anno.**

Al mi... Vi forgesis...

**Don' Juan'.**

Kion? Ke mi estas seninda ermito? Ke mia peka voĉo ne devas tie-ĉi tiel laŭte soni?

**D. Anno.**

Ŝajnis al mi.... Mi ne komprenis....

**Don' Juan'.**

Ha, mi vidas: Vi ĉion, ĉion ekkonis!

**D. Anno.**

Kion mi ekkonis?

**Don' Juan'.**

Jes, mi ne estas monaĥo... ĉe Viaj piedoj mi petas pardonon.

**D. Anno.**

Ho, Dio! Levu Vin, levu Vin! Kiu do Vi estas?

**Don' Juan'.**

Malfeliĉulo, ofero de senespera pasio!

**D. Anno.**

Ho, Dio mia! Kaj tie-ĉi, apud tiu-ĉi ĉerko! Iru for!

**Don' Juan'.**

Minuton, donino Anno, unu minuton!

**D. Anno.**

Se iu eniros!

**Don' Juan'.**

Krado estas fermita. Unu minuton!

**D. Anno.**

Nu? kio? Kion Vi postulas?

**Don' Juan'.**

Morton! Ho, mi mortu tuj ĉe Viaj piedoj, oni enterigu mian malfeliĉan cindron tie-ĉi same, ne apud cindro, kara por Vi, ne tie-ĉi, ne proksime,—ie malproksime, tie, ĉe pordo, ĉe sojlo mem, por ke Vi povu tuŝeti mian ŝtonon per malpeza piedo aŭ per vesto, kiam Vi pasos tien-ĉi, al tiu-ĉi fiera tombo klini buklojn kaj plori!

**D. Anno.**

Vi estas freneza.

**Don' Juan'.**

Ĉu deziro de morto estas signo de frenezo? Se mi estus frenezulo—mi volus resti viva, mi havus esperon tuŝi Vian koron per delikata amô; se mi estus frenezulo — mi pasigus noktojn apud Via balkono, maltrankviligante Vian songon per serenadoj; mi ne kaŝus min, mi, kontraŭe, penus esti ĉie rimarkita de Vi; se mi estus frenezulo—mi ne suferus silente...

**D. Anno.**

Kaj Vi tiel silentas?

**Don' Juan'.**

Okazo, donino Anno, okazo min forlogis! Alie Vi neniam sciigus mian malĝojan sekreton....

**D. Anno.**

Kaj longe jam Vi min amas?

**Don' Juan'.**

Longe aŭ nelonge — mi mem ne scias, sed nur de tia tempo mi scias koston de momenta vivo, nur de tiu tempo mi komprenis, kion signifas vorto „feliĉo“.

**D. Anno.**

Iru for. Vi estas danĝera homo.

**Don' Juan'.**

Danĝera! Per kio?

**D. Anno.**

Mi timas Vin aŭskulti.

**Don' Juan'.**

Mi eksilentos, nur ne pelu for tiun, por kiu vidi Vin estas sola konsolo. Mi ne havas arogantajn esperojn, mi nenion postulas, sed mi devas Vin vidi, se mi estas kondamnita al vivo

**D. Anno.**

Iru—tie-ĉi ne estas loko por tiaj paroloj, por tiaj malprudentaĵoj... Venu morgaŭ al mi; se Vi ĵuras konservi tian saman estimon al mi,—mi Vin akceptos, sed vespere, pli malfrue... Mi neniun vidas de tiu tempo, kiam mi vidviniĝis.

**Don' Juan'.**

Angelo, donino Anno! Dio konsolu Vin, kiel Vi mem konsolis hodiaŭ malfeliĉan suferanton!

**D. Anno.**

Iru for.

**Don' Juan'**

Ankoraŭ unu minuton.

**D. Anno.**

Ne, videble mi devas foriri... Krom tio mi ne estas disponita al preĝo. Vi min distris per mondaj paroloj: mia orelo longe, longe malkutimis de ili. Morgaŭ mi Vin akceptos...

**Don' Juan'.**

Mi ne estas ankoraŭ kuraĝa kredi, mi ne estas kuraĝa min redoni al mia feliĉo! Mi Vin ekvidos morgaŭ!... Kaj ne tie-ĉi, kaj ne sekrete!

**D. Anno.**

Jes, morgaŭ, morgaŭ. Kia estas Via nomo?

**Don' Juan'.**

Diego de Kalviro.

**D. Anno.**

Adiaŭ, Don' Diego.

(Ŝi foriras).

**Don' Juan'.**

Leporello!

(Leporello eniras).

**Leporello.**

Kio plaĉas al Vi?

**Don' Juan'.**

Kara Leporello! Mi estas feliĉa! „Morgaŭ... je vespero... pli malfrue“... Mia Leporello, — morgaŭ!... Pretigu... Mi estas feliĉa kiel infano!

**Leporello.**

Ĉu Vi parolis kun donino Anno? Ŝi, eble, diris al Vi du afablajn vortojn aŭ Vi ŝin benis?

**Don' Juan'.**

Ne, Leporello, ne! Ŝi difinis al mi sinvidon!

**Leporello.**

Ĉu efektive? O, vidvinoj! Vi ĉiuj estas tiaj!

**Don' Juan'.**

Mi estas feliĉa! Mi estas preta kanti, mi estas preta ĉirkaŭpreni tutan mondon!

**Leporello.**

Sed komandoro? Kion li diros pri tio-ĉi?

**Don' Juan'.**

Ĉu vi pensas, ke li estos ĵaluza? Jam kredeble ne: li estas prudenta homo kaj kredeble fariĝis pli kvieta de tiu tempo, kiam li mortis.

**Leporello.**

Ne, ekrigardu lian monumenton.

**Don' Juan'.**

Kio do estas?

**Leporello.**

Ŝajnas, ke ĝi rigardas Vin kaj koleras.

**Don' Juan'.**

Iru do, Leporello, petu ĝin veni al mi, ne, ne al mi, sed al donino Anno, morgaŭ.

**Leporello.**

Inviti monumenton! Kial?

**Don' Juan'.**

Jam certe ne por paroli kun ĝi. Invitu monumenton veni morgaŭ al donino Anno, malfrue vespere kaj stariĝi gardon.

**Leporello.**

Kiaj ŝercoj—kaj kun kiu!

**Don' Juan'.**

Iru do!

**Leporello.**

Sed...

**Don' Juan'.**

Iru!

**Leporello.**

Plejbona, bela monumento! Mia sinjoro, Don' Juan', humile petas vin veni... Je Dio, mi ne povas: mi havas timon.

**Don' Juan'.**

Timemulo! Jen mi donos al vi!

**Leporello.**

Permesu. Mia sinjoro, Don' Juan', vin petas veni morgaŭ pli malfrue en domon de Via edzino kaj stariĝi ĉe pordo...  
(Monumento balancas kapon je signo de konsento).

**Leporello.**

Aj!

**Don' Juan'.**

Kio estas tie?

**Leporello.**

Aj, aj! Mi mortos!

**Don' Juan'.**

Kio al vi okazis?

**Leporello** (balancante kapon).

Monumento... aj!

**Don' Juan'.**

Ĉu vi salutas?

**Leporello.**

Ne, ne mi—ĝi!

**Don' Juan'.**

Kian sensencaĵon vi parolas!

**Leporello.**

Iru mem.

**Don' Juan'.**

Nu, rigardu do, sentaŭgulo! (Al monumento).

Mi petas vin, komandoro, veni al via vidvino, ĉe kiu mi estos morgaŭ, kaj stariĝi gardon ĉe pordo. Kio? Ĉu vi venos?  
(Monumento ree balancas kapon).

Ho, Dio!

**Leporello.**

Kio? Mi parolis...

**Don' Juan'.**

Ni foriru.

---



## Sceno 4.

Ĉambro de D. Anno.

D. Anno kaj Don' Juan'.

**D. Anno.**

Mi Vin akceptis, Don' Diego; nur mi timas, ke mia malĝoja interparolo estas enua por Vi. Malfeliĉa vidvino, mi daŭrigas memori mian perdon; mi, kiel aprilo, miksas larmojn kun rideto.... Kial do Vi silentas?

**Don' Juan'.**

Mi plezuriĝas silente, profunde per penso esti en soleco kun belega donino Anno, tie-ĉi, ne tie, ne apud ĉerkujo de malviva feliĉulo kaj mi vidas Vin jam ne sur genuoj antaŭ marmora edzo.

**D. Anno.**

Don' Diego, Vi estas, sekve, ĵaluzema! Eĉ en ĉerko mia edzo Vin turmentas.

**Don' Juan'.**

Mi ne devas esti ĵaluza: li estis elektita de Vi.

**D. Anno.**

Ne, mia patrino ordonis al mi doni manon al Don' Alvaro. Ni estis malriĉaj, Don Alvaro estis riĉa.

**Don' Juan'.**

Feliĉulo! Li alportis sensignifajn trezorojn al piedoj de diino,—jen por kio li ĝuis paradizan feliĉon! Se mi Vin ekkonus antaŭe—kun kia ravo mian rangon, miajn trezorojn, ĉion mi fordonus,—ĉion por unu favora rigardo. Mi estus sklavo de Via sankta volo! Mi ellernadus ĉiujn Viajn kapricojn, por ke Via vivo estu unu senĉesa sorĉo! Ho ve! sorto aljuĝis alion al mi!

**D. Anno.**

Diego, ĉesu! Mi pekas, aŭskultante Vin, mi ne povas Vin ami: vidvino devas esti fidela eĉ al ĉerko. Se Vi scius, kiel min amis Don' Alvaro! Ho, Don' Alvaro, se li vidviĝus, jam kredeble ne akceptus ĉe si enamitan sinjorinon; li estus fidela al edza amo.

**Don' Juan'.**

Ne turmentu, donino Anno, mian koron per eterna ekmemoro pri edzo. Ĉesu min ekzekuti, kvankam mi meritis, eble, ekzekutadon.

**D. Anno**

Per kio-do? Ja Vi kun neniŭ estas ligita per sanktaj katenoj? Ja vere? Ja min ekaminte, Vi estas senkulpa antaŭ mi kaj ĉielo?

**Don' Juan'.**

Antaŭ Vi! Dio!

**D. Anno.**

Ĉu Vi estas kulpa antaŭ mi? Diru per kio do? Nu!

**Don' Juan'.**

Ne, neniam!

**D. Anno.**

Diego, kio estas? Ĉu Vi estas kulpa antaŭ mi? Per kio?—diru.

**Don' Juan'.**

Ne, ne eble!

**D. Anno.**

Diego, tio-ĉi estas strangal! Mi Vin petas, mi postulas....

**Don' Juan'.**

Ne, ne!

**D. Anno.**

Ho, jen kiel Vi estas obeam al mia volo! Sed kion Vi tuj diris? Ke Vi volus esti mia sklavo. Mi ekkoleros, Diego: respondu, per kio Vi estas kulpa antaŭ mi?

**Don' Juan'.**

Mi ne estas kuraĝa: Vi min malamos.

**D. Anno.**

Ne, ne! Mi Vin pardonas pli antaŭe, sed mi volas scii.

**Don' Juan'.**

Ne volu scii teruran, mortigan sekreton.

**D. Anno.**

Teruran!... Vi min turmentas: mi estas ekstreme scivola,— kio estas? Kaj kiel Vi povis min ofendi? Mi Vin ne konis; mi ne havis kaj ne havas malamikojn. Estas nur unu, mortiginto de edzo.

**Don' Juan'** (interne).

Afero iras al solvo.— Diru al mi: ĉu malfeliĉa Don' Juan' estas konata al Vi?

**D. Anno.**

Ne, mi neniam lin vidis.

**Don' Juan'.**

Ĉu Vi havas en animo malamon kontraŭ li?

**D. Anno.**

El devo de honoro. Sed Vi penas min detiri de mia demando, Don' Diego. Mi postulas...

**Don' Juan'.**

Kio okazus, se Vi renkontus Don' Juan'on?

**D. Anno.**

Tiam mi enpuŝus ponardon en koron de malbonulo.

**Don' Juan'.**

Donino Anno, kie estas Via ponardo? Jen estas mia brusto.

**D. Anno.**

Diego, kion Vi havas?

**Don' Juan'.**

Mi ne estas Diego,—mi estas Juan'.

**D. Anno.**

Ho Dio! Ne, neleble... mi ne kredas...

**Don' Juan'.**

Mi estas Don' Juan'.

**D. Anno.**

**Malvere.**

**Don' Juan'.**

Mi mortigis Vian edzon kaj mi ne bedaŭras pri tio kaj mi ne havas penton.

**D. Anno.**

Kion mi aŭdas? Ne, ne,—ne eble!

**Don' Juan'.**

Mi estas Don' Juan' kaj mi Vin amas.

**D. Anno.**

Kie mi estas? Kie mi estas? Mi svenas!

(Ŝi falas).

**Don' Juan'.**

Ĉielo! Kio estas kun ŝi? Kio estas kun Vi, donino Anno? Maldormiĝu, rekonsciiĝu: Via Diego, Via sklavo estas ĉe Viaj piedoj.

**D. Anno**

Lasu min. (Malforte) Vi, Vi, estas mia malamiko, Vi forprenis de mi ĉion, kio en vivo...

**Don' Juan'.**

Kara kreitaĵo! Mi estas preta pardonigi per ĉio mian ekbaton; mi nur atendas ĉe Viaj piedoj ordonon: ordonu — mi mortos, ordonu — mi spiros nur por Vi...

**D. Anno.**

Kaj tia estas Don' Juan'?

**Don' Juan'.**

Ĉu vere li estis priskribita al Vi kiel malbonulo, malhomo? O, donino Anno! famo, eble, ne estas tute malprava: sur laca konscienco, eble, kuŝas ŝarĝe multe da malbono; sed de tia tempo, kiam mi Vin ekvidis, ĉio ŝanĝiĝis: ŝajnas al mi, ke mi tuta renaskiĝis! Vin ekaminte, mi amas virton kaj je unua fojo mi fleksas humile antaŭ ĝi tremantajn genuojn.

**D. Anno.**

Ho. Don' Juan' estas elokventa — mi scias. Mi aŭdis: li estas ruza homo... Vi estas, oni diras, malpia malĉastulo, Vi estas efektiva demono. Kiom da malfeliĉaj virinoj Vi pereigis?

**Don' Juan'.**

Ĝis nun mi ne amis eĉ unu el ili.

**D. Anno.**

Kaj ĉu mi kredos, ke Don' Juan' enamiĝis je unua fojo, ke li ne serĉas en mi novan oferon!

**Don' Juan'.**

Se mi volus Vin trompi, — ĉu mi konfesus, ĉu mi dirus tiun nomon, kiun Vi ne povas aŭdi? Ĉu oni vidas en tio pripensadon, malicon?

**D. Anno.**

Kiu Vin scias? Sed kiel Vi povis veni tien-ĉi: oni povus te-ĉi Vin rekoni kaj Via morto estus neevitebla!

**Don' Juan'.**

Kion signifas morto? Mi fordonos senplende vivon por dolĉa momento de sinvido.

**D. Anno.**

Sed kiel do Vi, malsingardema, eliros de tie-ĉi?

**Don' Juan' (kisante ŝiajn manojn).**

Kaj Vi zorgas pri vivo de malfeliĉa Juan'? Sekve malamo ne havas lokon en Via ĉiela amo, donino Anno?

**D. Anno.**

Ho, se mi povus Vin malami! Tamen ni devas disiĝi.

**Don' Juan'.**

Kiam do ni ree nin vidos?

**D. Anno.**

Mi ne scias; iam.

**Don' Juan'.**

Sed morgaŭ?

**D. Anno.**

Kie do?

**Don' Juan'.**

Tie-ĉi.

**D. Anno.**

Ho, Don' Juan', kiel mia koro estas malforta!

**Don' Juan'.**

Al adiaŭdiro pacan kison...

**D. Anno.**

Iru, tempo estas.

**Don' Juan'.**

Unu, malvarman, pacan...

**D. Anno.**

Kia trudema Vi estas! Jen Vi ĝin havas. . (Oni frapas).  
Kia frapo estas tie?... Ho, kaŝu Vin, Don' Juan'!

**Don' Juan'.**

Adiaŭ do, ĝis sinvido, mia kara amikino (Li foriras kaj ree enkuras). Ha!...

**D. Anno.**

Kio estas al vi?

(Monumento de komandoro eniras. D. Anno falas).

**Monumento.**

Mi aperis laŭ voko.

**Don' Juan'.**

Ho, Dio! Donino Anno!

**Monumento.**

Lasu ŝin, — ĉio estas finita. Ĉu vi tremas, Don' Juan'?

**Don' Juan'.**

Mi? ne! Mi vin invitis kaj ĝojas, ke mi vin vidas.

**Monumento.**

Donu manon.

**Don' Juan'.**

Jen ĝi estas... O, multepeza estas premo de lia ŝtona mano! Lasu min, forlasu mian manon!... Mi pereas... finita...  
Ho, donino Anno!

(Ili falas en teron).

